

# LA JUNA BATALANTO

Organo de la Internacia  
Katolika Junulara kaj Paca Movado

ELDONATA DE

MONDJUNULARO KATOLIKA, MOKA

Redaktoro : D-ro WILHELM SOLZBACHER.

## ENHAVO :

**Maurice Lecat**, La Sanga Internacio de la Militindustrio (Antaŭ la milito — Dum la milito — Post la milito) — **W. S.**, Aktiva Pacifismo. — **S. C. Leung**, Preĝo por la Landoj en la Malproksima Oriento. — **Juna Batalanto**, Al niaj gelegantoj. — **Mondjunularo Katolika**. — **Pawel Roch**, La Pacifista Movado en Polujo (Fino). — **Nia Movado**. — **Sur Nia Librotablo**.

REDAKCIO : Köln — Dellbrück, Bensberger Marktweg, 63, Germ.

Eldonejo : ELDONA KOOPERATIVO LA JUNA BATALANTO,  
Köln-Dellbrück, Bensberger Marktweg, 63, Germ. (Regina Solzbacher).

## Abonprezoj de "La Juna Batalanto",

Normala abonprezo : jare 2 germanaj markoj, kun MOKA-membreco 3 M. La eldonejo akceptas monbiletojn, ĉekojn, poŝtmandatojn, respondkuponojn, germanajn poŝtmarkojn.

Lando	jara abono	kun MOKA-kotizo	simpla kotizo	Lando	jara abono	kun MOKA-kotizo	simpla kotizo
Anglujo	2 s 4 p	3 s	1 s 3 d	Hungarujo	2,4 p	4 p	2 p
Argentino	1,50 p	2 p	1 p.	Italujo	9 l	14 l	5 l
Azio	2 s	3 s	1 s 3 d	Japanujo	2 s	3 s	1 s 3 d
Aŭstralio	2 s	3 s	1 s 3 d	Jugoslavujo	30 diu.	40 d	15 d
Aŭstrujo	3,40 s	5 s	2 s	Litovujo	5 lit.	7 l	3 l
Belgujo	3,50 b	6 b	2 b	Luksemburgo	18 fr	25 fr	10 fr
Brazilo	4 mr	5 mr	2 mr	Meksiko	0,50 dol	0,75 d	0,30 d
Ĉeĥoslov.	16 kr	20 kr	10 kr	Nederlando	1,25 fl	2 fl	0,80 fl
Danujo	2 kr	3 kr	1 kr	Polujo	4 zl	6 zl	3 zl
Danzig	2 g	3 g	1,20 g	Portugalo	8 esc	12 e	5 esc
Francujo	12 fr	18 fr	6 fr	Rumanujo	80 lei	100 l	40 lei
Germanujo	2 M	3 M	1,20 M	Svedujo	2 kr	3 kr	1 kr
Grekujo	38 dr	50 dr	15 dr	Svisujo	2,50 fr	4 fr	1,50 fr
Hispanujo	3 p	4,50 p	2 p	Usono	0,50 dol	0,80 dol	0,30 dol

Ni akceptas ankaŭ pagojn por duona jaro aŭ kelkaj jaroj. Membroj de MOKA ricevos ankaŭ aliajn publikigaĵojn. Donacoj por la subtena kaso (liverado de J. B. al malriĉuloj) estas invitataj.

*Abonejoj* : Krom al la eldonejo oni povas ankaŭ pagi al la naciaj sekretarioj de MOKA.

*Poŝtkontoj*. Germanujo : Köln 430 37 (Dr. Wilh. Solzbacher, Köln-Dellbrück); Francujo : Strasbourg 8180 (P. I. A. Muffang, Bourg-la-Reine); Aŭstrujo : Wien D 12.017 (Katholisches Kreuzbündnis für Oesterreich, Ortsgruppe Heiliges Feuer).

### ESPERANTO EN LA SERVO DE LA INTERNACIA KATOLIKA AGADO!

#### Katolikajn informojn el la tuta mondo

rapide havigas al vi la dusemajna, grandformata, riĉe ilustrita gazeto KATOLIKA VIVO. Direktoro : Pastro Georges Ramboux, Paris.

#### La internacia katolika junulara kaj paca movado

eldonas por vi sian riĉenhavan, vivece verkitan, kuraĝe batalantan dumonatan organon LA JUNA BATALANTO. Redaktoro : D-ro Wilhelm Solzbacher, Köln.

#### Kombinita abono al Katolika Vivo kaj La Juna Batalanto

kostas por tuta jaro 6.— RM., por duona jaro 3.— RM. Oni pagas al **Eldonejo La Juna Batalanto, Dr. W. Solzbacher, Köln-Dellbrück, Bensberger Marktweg 63, Germanujo** aŭ al la Poŝtkontoj sciigataj sur la dua kovrila paĝo de ĉi tiu gazeto. Banknotoj, ĉekoj, poŝtmandatoj, respondkuponoj, UEA-kuponoj ktp. estas akceptataj.

**NOTU** la novan komunan adreson de la Internacia Oficejo de MOKA kaj de Redakcio kaj Administracio de LA JUNA BATALANTO: Köln-Dellbrueck, Bensberger Marktweg 63, Germanujo.

## La Sanga Internacia de la Militindustrio.

Okaze de la nuna Internacia Malmarmada Konferenco de Genève estas bone, iom pripensi kaj konigi certajn faktojn pri la rolo de kapitalistaj profitserĉantaj potencoj en la preparado de la milito. El grandega dokumentaro ni elĉerpas nur kelkajn. Ili pravas, ke malantaŭ la belaj frazoj pri patrolando, sanktaj bonoj kaj nacia honoro ofte kaŝiĝis kaj kaŝiĝas tre materiaj intereso.

### Antaŭ la milito.

1905-1907 fondiĝis internacia vendosindikato, al kiu i. a. apartenis germanaj fabrikejoj de armiloj kaj municioj kaj la Nacia Fabrikejo de Militarmiloj de Herstal (Belgujo). La kontrakto diras : « Ĉiu liverado de pafiloj kaj karabenoj okazos komune kaj la profitoj estos disdonataj. La grupoj helpos unu la alian. La membroj de la sindikato disponigos unu al la alia senpage la desegnaĵojn, projektojn kaj kalkulaĵojn pri la modeloj. La prezoj estos fiksataj per komuna interkonsento. Tiuj, kiuj sub la nomitaj kondiĉoj estos ricevintaj mendojn, pagos ĉe la liverado po 15 frankojn al la sindikata kaso. »...

Du jarojn antaŭ la batalo de Sedan, la 29 aprilo 1868, la germana kannonfabrikanto Krupp — kiu cetere estis oficiro de la Franca Honora Legiono — sendis al Napoleono III-a sian novan katalogon kun granda laŭda artikolo pri la ŝtalkanonoj, kiujn lia fabrikejo, kiel Krupp diras en la akompana letero, « fabrikis por diversaj grandaj ŝtatoj de Eŭropo »! Al tio la imperiestro respondis per sia danko kaj la esprimo de siaj bonaj deziroj « por la **sukceso kaj la evoluo de industrio, kiu devas fari al la homaro bonegajn servojn!** » Laŭvorta citado! Certe povas okazi, ke imperiestro estas malinteligenta. Sed tiugrade! Post Sedan li eble ŝanĝis sian opinion kaj siajn bondezirojn...

Ankoraŭ en la jaro 1914, dum kiam Poincaré iris al Peterburgo, por subskribi francan-rusan kontrakton, la firmo Krupp (Essen) kaj Schneider-Creusot (Francujo) faris kontrakton, por ne fari konkurencon unu al la alia! Dum tiu tempo iliaj inĝenieroj frate kunlaboris en la fabrikejoj Putkof je la modernigo de la armiloj de la caro...

### Dum la milito.

La angla ŝiparo, kiu batalis kontraŭ la germanoj ĉe la Skager-Rak, posedis optikajn instrumentojn de germana deveno, liveritajn ses monatojn antaŭe de la firmoj Zeiss-Jena kaj Goerz-Anschütz. Ankaŭ la francoj ekzakte observadis la germanajn soldatojn per Zeiss-instrumentoj. La germana firmo Magdeburger Draht- und Kabelwerke liveris al Francujo la pikdraton, en kiu antaŭ Verdun en Douaumont mortis centmiloj da germanaj soldatoj! Kaj la marsoldatoj en la submarboatoj de Germanujo kruele pereis, kaptite en retoj liveritaj de samlandanoj al la angloj.

Krupp vendis al Anglujo sian patenton pri tankoj. Krome li donis al la angla firmo Vickers patenton pri grenadbruligiloj, kontraŭ pago de 1 ŝilingo po grenado. La tiel postulita sumo estis 125 milionoj da ŝilingoj, kaj laŭ tio oni facile povas elkalkuli, kiom la germana firmo Krupp profitis po kapo de ĉiu germana soldato mortfalinta en Flandrujo sub la anglaj grenadoj...

La angloj estas masakritaj en la Dardaneloj per kanonoj liveritaj de iliaj samlandanoj al la turkoj. La sama afero okazis al la aŭstraj soldatoj, kiuj dormas sian lastan dormon en Galicio.

Jam en la batalo de Königgrätz (Hradec Kralove) germanaj fratoj mortpafis unu la alian per kanonoj, kiuj frate eliris el la samaj fabrikejoj kaj kies profitoj frate iris en la saman kason...

### Post la milito.

La Shearer-skandalo fluigis multe da inko. Tiu reklamagenteo de kelkaj grandaj usonaj firmoj por konstruado de militŝipoj sukcese agadis por malsukceso de la dua konferenco por mara malarmado, kiu en junio 1927 kunvenigis en Genève la delegitojn de Usono, Japanujo kaj Britujo...

Oni eksciis en Eŭropo, ke 143 000 dolaroj estas donitaj al usonaj senatanoj, por ke ili voĉdonu por la leĝo Jones-White pri la konstruo de militŝipoj.

Ankaŭ tiuj, kiuj en Usono kontrolas la kemian industrion, sukcesis malhelpi, ke la ĝeneva projekto pri la gasmilito estus diskutata en la usona senato.

En oficiala publikigaĵo de la franca Komerca Ministerio oni legis jenan reklamon : « Armiloj kaj municioj, grenadoj de ĉiuj kalibroj, torpediloj de ĉiuj markoj francaj kaj eksterlandaj. »

Maurice LECAT

(el « Contre la Guerre avec Einstein »).

## “ AKTIVA PACIFISMO „

*Gewalt und Gewaltlosigkeit*, Handbuch des aktiven Pazifismus, im Auftrage der Internationale der Kriegsdienstgegner herausgegeben von Franz Kobler. Zürich und Leipzig 1928, Rotapfel-Verlag, 392 pĝ., tolbind. 8.— sv. fr. aŭ 6.40 RM.

*Berichte zur Kultur- und Zeitgeschichte*, herausgegeben von Nikolaus Hovorka. N-roj 102-107, Aktiver Pazifismus, Wien 1931, Reinhold-Verlag, Löblichgasse 3.

Jen enciklopedio de la batalo kontraŭ la milito! Homara dokumento, kies eldono postulis multe da kuraĝo kaj konstanta laborado, ankaŭ multe da vasta kompreno kaj scio. La Viena katolika ĵurnalo « Reichspost » d-ris en sia recenzo : « La verko estas agado forta kaj valora, plena kaj vigla impulso al paca penetrado de la mondo ». Aliflanke la katolika ĵurnalo de Rotterdam, « De Maasbode », komencis sian recenzon per la konstato : « Tio ne estas libro por katolikoj! » Same malsamaj estis la juĝoj en aliaj rondoj. Kial do?

La libro de D-ro Kobler ne volas doni agrablan unuforman teorion kaj doktrinon, sed ĝi intencas respuguli la fortojn, kiuj agadas por paca revolucio de la mondo. Kobler eldonis, ĝin en la nomo de la Internacio de Militkontraŭuloj (angle : War Resisters' International), kiu organizas homojn de ĉiuj religiaj kaj kulturaj tendencoj, kiuj akceptas la konfeson kaj promeson : « **Milito estas krimo kontraŭ la homaro. Ni tial estas decidintaj, subteni nenian militon kaj batali por la forigo de ĉiuj militkaŭzoj.** » La mondkonceptoj, sur kiuj bazas tiu deklaro, estas treege malsamaj, kaj la libro de Kobler devis doni esprimon al ĉiuj. Krome la tasko

estis ankoraŭ pli malfacila por la unua parto « La problemo de la perforto », en kiu multaj kunlaboris, kiuj ne estas anoj de absoluta pacifismo.

Unue ni diru, ke la ĉeftitolo « Perforto kaj senperforto » ŝajnas al ni ne plene doni la temon de la verko, sed ke la subtitolo « Manlibro de la Aktiva Pacifismo » multe pli esprimas la enhavon. La problemo de la perforto estas tre komplikita, kaj en ĝiaj delikataj lastaj aspektoj ankaŭ la libro de Kobler ne sukcesis nepre klarigi ĝin. Pli simpla estas la problemo, se temas pri la milito kaj speciale pri la moderna milito, kaj tiu problemo estas klare elmontrita kun ĉiuj ĝiaj malfacilaĵoj. La korespondado inter Henriette Roland-Holst kaj Clara Meijer-Wichmann aŭ la dialogo de Helene Stöcker pravas, ke oni ne akceptis ian naivan, nepripensitan solvon de malfacila problemo. La voĉoj de katolikoj kaj protestantoj, judoj kaj eksterekleziaj kristanoj, socialistoj kaj anarkiistoj montras la variecon de la pensado, kiu tamen havas multe da komuna rezultoj.

Ke oni devas legi tiun libron kritike, ne bezonas esti dirate. Oni ne povas sekvi samtempe Theodor Lessing kaj Leonhard Ragaz, M. K. Gandhi, Pierre Ramus kaj L. Nelson, Max Holz kaj John W. Graham, Nikolaus Ehlen kaj Kurt Hiller. Nia amiko Nikolaus Ehlen skribis profundan artikolon : « Pri la katolika Eklezio kaj la uzo de perforto ». Ni estus dezirintaj, ke ankoraŭ alia katolika kunlaboranto estus skribinta pri la teologiaj doktrinoj rilate la militon.

Pli unueca estas la dua parto, kiu rakontas pri la evoluo de la aktiva pacifismo, kaj la tria, kiu parolas pri metodoj kaj praktiko. Grava estas la aldono, kiu publikigas interesajn dokumentojn.

La verko estas tre valora kaj prezentas produkton de giganta laboro. Ĝi ankoraŭ ne estas tiom perfekta kaj kompleta, kiel ni dezirus, kaj laŭ kristana kaj katolika vidpunkto oni povus proponi kelkajn ŝanĝojn kaj kompletigojn.

Sed jen alia publikigaĵo, kiu estas grava kaj utila aldono : la bonega dokumentiga gazeto « **Berichte** », eldonata de nia katolika kaj Esperantista samideano Nikolaus Hovorka, eldonis specialan numeron pri la libro de Kobler, analizante la enhavon, donante aldonojn kaj interesan kompilaĵon de gazetkritikoj. Tiu kajero (240 paĝoj, prezo 2.— RM) estu rekomendata al niaj geamikoj, al tiuj, kies mono ne sufiĉas, por aĉeti la manlibron de Kobler, kaj ankaŭ al tiuj, kiuj deziras bonan gvidanton kaj komenton.

W. S.

## Preĝo por la Landoj en la Malproksima Oriento.

S. C. Leung, fina sekretario de la Kristanaj Asocioj de Junaj Viroj, proponis jenan preĝon por la Paco en la Oriento. Li estas protestanto, sed la preĝo estas vere kristana kaj akceptebla de ĉiuj kristanoj :

« Ho Sinjoro, nia Patro, instruu nin preĝi en ĉi tiuj tagoj por niaj landoj Ĥinujo, Koreo kaj Japanujo, por niaj nacioj, politikistoj kaj militistoj, por ĉiuj, kiuj havas gvidantan funkcion kaj influas la publikan opinion!

Donu al ni novan spiriton, ke en ĉi tiu tempo de nacia malamo kaj obstineco ni pli serĉu trovi la veron ol gardi niajn rajtojn kaj plifortigi la aŭtoritaton de la nacio! Helpu nin, vidi la faktojn kaj malestimi la mensogon kaj trompantan propagandon! Kaj vekigu en ni la spiriton de nia Savinto, por ke ĉiu klare ekkonu, kio kreskigas Vian amon en lia najbaro kaj malamiko!

Ni konfesas antaŭ vi niajn pekojn kiel nacio kaj socio. Ni estis fieraj. Ni faris postulojn al niaj proksimuloj, ne havante la rajton al tio. Fortigu en ni, nia Patro, la sincerecon de nia pento, kaj helpu nin, ke ni restu fidelaj al vi kaj al viaj ordonoj, kiel ni deziras resti fidelaj al nia kara lando kaj ĝia granda tradicio.

Donu al ni pacon en ĉi tiuj tagoj, ne la pacon de la subpremantoj, kiuj rompis ĉiun reziston kontraŭ iliaj deziroj, ne la pacon de ruzaj politikistoj, kiuj serĉadas vanan sukceson, ne la pacon de sklavo, kiuj perdis sian animon, sed la pacon de liberaj homoj, kiuj post sincera pento de siaj pekoj kaj purigo de siaj koroj klopodas realigi Vian Regnon de amo kaj justeco en frata kunlaboro de homoj kaj nacioj.

Por tio ni preĝas al vi per Jesuo Kristo, Nia Sinjoro! Amen. »

## AL NIAJ GELEGANTOJ.

Ĉi tiu numero estas la lasta de la 6-a abonjaro de La Juna Batalanto. Kaj ni sendas kun ĝi al niaj abonantoj tutkoran dankon pro ilia helpo kaj fideleco. Por nia gazeto la pasinta jaro signifis gravan sukceson. La nombro de la abonantoj malgraŭ la ekonomia krizo preskaŭ duobligis, kaj nia kara Juna Batalanto nun fine atingis tiun ŝtaton, ke la abonkotizoj sufiĉas por kovri la kurantajn elspezojn.

Se ni rigardas en niajn librojn, la pasinta abonjaro 1931/32 ne nur ne havis deficiton, sed eĉ rezultigis malgrandan gajnon, kiu servis por pagi la deficiton el la lasta jaro. Nia situacio nun estas multe pli firma ol antaŭe, kaj ni esperas efektiviĝi diversajn gravajn plibonigojn de nia gazeto en la venonta jaro.

Bedaŭrinde multaj el niaj geamikoj grave suferas per la ekonomia krizo. Ni petas ilin, ke ili malgraŭ tio restu fidelaj al nia movado kaj nia gazeto. Kaj se per ĉiuj klopodoj la modesta abono ne povas esti pagata, la kristana fratamo de aliaj, kiuj pagos iom pli, devos helpi.

Ni devas ankaŭ peti vian pardonon pro la neperfekteco de nia gazeto. En la lasta jaro la redaktoro havis multe tro multe da aliaj laboroj kaj tial li ne povis prizorgi la gazeton, kiel li faris tion antaŭe kaj kiel li estus dezirinta. Felice li povas informi vin, ke estonte li denove havos iom pli multe da tempo por la redaktado de La Juna Batalanto, kiun tiom multaj gesamideanoj ĉiulandaj tiom ŝatas.

Sendube ni havas nun la plej grandan abonantaron el ĉiuj katolikaj gazetoj aperantaj en Esperanto. Kaj certe neniu Esperanto-gazeto havas tiom da simpatioj en la junularo kaj ankaŭ en la pastraro.

Multaj eminentuloj serioze interesiĝis pri niaj aferoj. Krom la pli ol 30 episkopoj, kies intereson ni konas kaj al kiuj ni regule sendadas senpage La Junan Batalanton, ni havas du episkopojn diverslandajn kiel pagantajn abonantojn en niaj listoj.

Ni estas radikale kaj ortodokse katolikaj, sed la pozitiva maniero, en kiu ni klopodas prezenti niajn ideojn, gajnis al ni multe da simpatioj ankaŭ en nekatolikaj rondoj. Inter niaj pagantaj abonantoj troviĝas protestantoj, judoj kaj liberpensuloj.

Kaj nun je la fino de la abonjaro insista kaj sincera peto : Restu fidelaj! Bonvolu ne forgesi, ke nun estas tempo, por pagi vian abonkotizon! Se vi povas, bonvolu aldoni iom, por ke J. B. povu esti sendata senpage al malriĉuloj!

Forte tenu nian standardon! Estu atestantoj kaj batalantoj de la Princo de la Paco! Kun malnova fideleco kaj nova kuraĝo ni marŝas en la novan abonjaron!

LA JUNA BATALANTO.

## MONDJUNULARO KATOLIKA.

**Celo** : Internacia kunlaborado de katolikaj gejunuloj ĉiulandaj, agado por internacia kaj socia paco laŭ la devizo de nia papo « Pax Christi in Regno Christi », « La Paco de Kristo en la Regno de Kristo ». — Kreo de personaj rilatoj inter katolikaj gejunuloj ĉiulandaj por intersanĝo de ideoj kaj spertoj. Kreo de praktikaj institucioj tiuelaj. Forta internacia solidareco per uzo de komuna internacia help-lingvo (Esperanto).

**Praktikaj taskoj** a) Starigo de delegitoj en ĉiuj eble plej multaj lokoj kaj grupoj de la katolika junularo (ĝis nun en 35 landoj de ĉiuj kontinentoj).

b) Klerigo kaj informado de la katolika junularo pri problemoj kaj institucioj de la internacia vivo.

c) Perado de internacia korespondado kaj libertempo-intersanĝo, helpo en internaciaj vojaĝoj (korespondado ĝis nun inter 40 landoj).

d) Okazigo kaj partopreno de internaciaj kongresoj kaj kunvenoj. (Propraj kongresoj en Graz, Luxembourg, Konstanz, Lugano, Oxiord, Barcelona, pli malgrandaj internaciaj kunvenoj en Venlo, Louvain, Altenberg, Torino, Köln, partopreno je multaj aliaj kongresoj).

e) Eldonado de internacia organo de la katolika junularo « La Juna Batalanto », redaktata en Esperanto, legata en 80 landoj, en kelkaj landoj ankaŭ nacilingvaj organoj.

f) Kunlaborado en internaciaj katolikaj asocioj, en la paca kaj Esperantista movado.

g) Propagando de Esperanto, precipe en la katolika junularo.

h) Informado pri katolika junularo kaj paca movado en ĉiuj landoj.

**Protectoro** estas Lia Episkopa Moŝto grafo D-ro G. K. Majlath, episkopo de Transilvanio (Rumanujo).

**Organizo**. La internacia oficejo estas en Köln (Germanujo). Ĝi estas administrata de ĉefsekretario kaj ekzekutiva komitato. Naciaj sekretarioj en 20 landoj. La lokan laboron gvidas la loka delegito aŭ loka grupo. Internacia estraro de la movado estas la Internacia Komitato konsistanta el la naciaj kaj la internaciaj sekretarioj.

**Membreco**. a) Aktivaj membroj. De ili oni deziras praktikan kunlaboron, lernadon de Esperanto, kotizon; b) Subtenantaj membroj pagas kotizon; c) Korporativaj membroj povas fariĝi asocioj kaj grupoj, kiuj aprobas la celojn de MOKA kaj pagas kotizon.

### EL LA HISTORIO DE LA MOKA-MOVADO.

**Antaŭhistorio** : Meze en la Mondmilito, en la jaro 1916, malmultaj katolikoj diverslandaj unuiĝis en la Mondpaca Ligo Blanka Kruco, por sekvi kaj defendi la pacan programon de Papo Benedikto XV-a. La internacia korespondanta lingvo de la ligo estis Esperanto. Ankoraŭ dum la milito aperis la unua numero de la gazeto Blanka Kruco en Esperanto kaj germana lingvo. En la Mondpaca Ligo kunlaboris ankaŭ kelkaj junuloj.

1919. « Blanka Kruco » publikigis en sia decembra numero alvokon por fonda de internacia ligo sub la nomo Mondjunularo Katolika (MOKA), subskribitan de la Breslaŭa teologia studanto E. Pickorz. Ĝi estis verkita Esperante kaj germane kaj diris i.a. : « La grandeco de la tempo, kiun ni travivas, alvokas nin kun admonanta voĉo : Levigu! Ni staras sur la ruinoj de pasinta epoko, sed jam anonciĝas nova tempo! Antaŭ nelonge la franca socialista ĵurnalo « Humanité » publikigis alvokon al la studentaro de la tuta mondo, ke ĝi komencu internacian ideintersanĝon kaj realigu la spiritan interfratiĝon de la homaro. Ĉu tiuj agado, dum kiam ni eterne restadas en la stato de hieraŭ? Ĉu ni ne estas katolikoj, kiuj devus senti kaj pensi universale? Ĉu nia Dia majstro ne donis al ni la ordonon de la amo? Se tiu amo estas vivanta en ni, se ni estas ne nur aŭskultantoj, sed realigantoj de la vorto, tiam tiu amo pelos nin al interkompreniĝo kun niaj naciaj najbaroj, des pli, ĉar la malamo inter la nacioj ne voĉas ĉes... La solvo de la internaciaj taskoj, kiuj estas postulata de nia tempo, estas neehla sen internacia help-lingvo : ESPERANTO. Pacifistaj revoj ne sufiĉas; estas necese praktike labori por la repacigo de la mondo per la disvastigo kaj uzo de nepre necesa helpilo de la interkompreniĝo, de interkompreniga lingvo... » Ni citis nur kelkajn frazojn el la alvoko, kiun en la energiaj vortoj de la postmilita generacio vokis al agado. La sama numero de « Blanka Kruco » jam faris tre praktikajn proponojn. Ĝi enhavas artikolon verkitan de Walter Menz « Esperanto en la katolika junulara edukado ».

1920. Definitiva fonda de Mondjunularo Katolika en Hago (Nederlando). Unuaj gvidantoj : Pastro D-ro M. J. Metzger (Aŭstrujo), Prof. W. Arnold (Svisujo, + 1930). Prelato kaj Deputito D-ro Sandor Giesswein (Hungarujo, + 1923), Hanns Sappl (Germanujo). MOKA unue estis en intimaj rilatoj kun la Ligo Internacio Katolika (IKA).

En 1920 aperis la unua broŝuro klariganta la programon kaj provizoran organizon de MOKA. Oficiala lingvo fariĝis Esperanto, organoj estis « Blanka Kruco » kaj « Espero Katolika » kiu tiam estis organo de IKA. La Centra Oficejo estis en Graz (Aŭstrujo). Protektoro fariĝis Episkopo Majlath en Rumanujo.

**1921.** Fondiĝis la gazeto « Katolika Mondo », kiu fariĝis ankaŭ organo de MOKA. Unua Kongreso de MOKA en Graz, 11-12 aŭgusto, sub prezido de Prof. P. J. A. Muffang (Francujo) kaj Pastro Benkovič (Jugoslavujo), kiuj ambaŭ ankoraŭ nun estas aktivaj kunlaborantoj. Paroloj de ĉefsekretario Sappl (Graz) kaj Prof. Arnold (Zug). Apero de 48-paĝa broŝuro de Sappl pri « Ni katolikoj kaj la internacia junulara movado ». Fondo de naciaj sekretariejoj en 8 landoj. Flugfolioj de MOKA en Esperanto, germana, franca, itala kaj hispana lingvoj.

**1922.** MOKA-Kongreso en Luxembourg sub prezido de Pastro Klement (Ĉeĥoslovakujo) kaj Pastro Suter (Svisujo). Kontakto kun multaj asocioj de la katolika junularo, oficiala aliĝo de kelkaj el ili al MOKA.

**1923.** Translokigo de la Centra Oficejo de Graz al München. Kongreso en Konstanz sub prezido de Hanns Sappl (Germanujo) kaj Charles Gravey (Francujo). Granda publika kunveno sub honorprezido de Episkopo D-ro Fischer-Colbrie de Košice (Ĉeĥoslovakujo). Paroladis: Prof. Arnold (Svisujo), Prelato D-ro Giesswein (Hungarujo), Prelato Ledochowski (Ĉeĥoslovakujo), Prof. Muffang (Francujo), Pastro D-ro Cieszyński (Polujo), Pastro D-ro Metzger (Aŭstrujo), Charles Gravey (Francujo), ĉefsekretario H. Sappl (Germanujo), Episkopo D-ro Fischer-Colbrie (Ĉeĥoslovakujo). Akcepto de nova programo. Reorganizo de la movado en kelkaj landoj.

**1924.** «Fondo de la « Junula Angulo » en « Katolika Mondo » kiel organo de MOKA. IV-a Kongreso de MOKA en Lugano sub prezido de ĉefsekretario Sappl (Germanujo) kaj Pastro Prot. Flajollet (Francujo). Preparolo de energia paca agado.

**1925.** La « Junula Angulo » fariĝis ĉiunonata sub sendependa redaktoro (Wilhelm Solzbacher), kiu ankaŭ fariĝis vicĉefsekretario de MOKA. V-a Kongreso de MOKA en Oxford sub prezido de W. Solzbacher. Paroloj de H. John (Anglujo) W. Solzbacher (Germanujo), D-ro W. Hinzenkamp (Germanujo); ĉeestis delegitoj el Ĥinujo, Ĉilio kaj Usono. Kunlaboro duoficiala de MOKA en la internaciaj kunvenoj de Chevreuse (Francujo) kaj Luxembourg (Luksemburgo).

**1926.** Fondo de « La Juna Batalanto », unue kiel aldono al « Katolika Mondo », sub redaktado de W. Solzbacher. La unua numero enhavis artikolojn de H. Sappl, H. Kolvenbach, W. Solzbacher (Germanujo), Albert Yong (Ĥinujo), Lawrence Gonsalves (Brita Okcidenta Hindujo), Joao Vianna (Brazilo), Eduard Macheiner (Aŭstrujo), Stefano Belovay (Jugoslavujo). Gajno de kunlaborantoj en multaj landoj. Grandnumbra partopreno de MOKA-anoj je la Internacia Demokrata Paca Kongreso en Bierville (Francujo) kun la temo: « La Paco per la Junularo! », krome duoficiala partopreno je internaciaj konferencoj en Clervaux (Luksemburgo), Chevreuse (Francujo), Le Havre (Francujo), Einsiedeln (Svisujo), Heidhausen (Germanujo), W. Solzbacher fariĝis ĉefsekretario de MOKA.

**1927.** Oficiala kunlaboro de MOKA je la katolika pola-germana konferenco en Warszawa (Polujo) kaj je la Internacia Junulara Tendaro en Vaumarcus (Svisujo) sub la temo « Sankta Francisko kaj nia tempo ». MOKA organizis sukcesan Esperanto-Kunvenon de la katolika junularo en Hoheneck (Germanujo). Eldono de alvoko « Katolika Junularo kaj Esperanto », subskribita de gvidantoj el pli ol 40 katolikaj junularaj kaj pacaj ligoj en germanlingvaj landoj. Publikigo de tiu alvoko en multaj jur-naloj kaj revuoj, publikigo en formo de flugfolio (pli ol 12 000).

**1928.** Partopreno je pli ol 10 internaciaj konferencoj. Plioftigo de « La Juna Batalanto ». Kontaktoj kun grandaj asocioj. Novaj naciaj sekretarioj. En julio fondo de la Ekzekutiva Komitato de la internacia oficejo, ĉar la laboro tro kreskis. Esperanto-kunveno de MOKA en Honnef (Germanujo).

**1929.** Pro la morto de « Katolika Mondo » sendependa eldono de « La Juna Batalanto », fondo de Eldona Kooperativo, publikigo de flugfolioj kaj broŝuroj diverslingvaj, bultenoj en germana, franca, angla, hispana, kataluna, ĥina lingvoj. MOKA organizis 4 internaciajn kunvenojn kaj kunlaboris je multaj aliaj. Limkunveno de katolika junularo el Nederlando, Germanujo kaj Anglujo okazis en Venlo (Nederlando), kunveno de belgaj kaj germanaj junulargvidantoj okazis laŭ iniciato de MOKA en Louvain, kunveno pri misiaj problemoj estis en Torino (Italujo) sub honorprezido de Episkopo Octavio Ortiz Arrieta el Chachapoyas (Peruo), kaj sub prezido de Fr. J. M. Puiŝys S. S. (Litovujo) kaj Peter Klein (Germanujo). — VI-a Kongreso de MOKA en Barcelona sub prezido de Pastro Salvador Ester Palau (Barcelona). Paroladoj de Pastro Salvador Ester (Hispanujo), Pastro Francisko Gebliard (Luksemburgo), Pastro Pelikan S. J. (Ĉeĥoslovakujo), Aloys Seyock (Germanujo), Heinz Kolvenbach (Germanujo), Wilhelm Solzbacher (Germanujo), Pastro de Morlaincourt (Francujo), Pastro D-ro Kendler (Germanujo), Carl Degen (Germanujo), Pastro Manuel Maria Vergés S. J. (Hispanujo), Prof. Manuel de Monteliu (Hispanujo). Akcepto de nova regularo de MOKA.

**1930.** La Sankta Patro benis la MOKA-movadon per letero de la ŝtata Sekretario Kardinalo Pacelli al Episkopo Majlath, protektoro de MOKA (15 februaro 1930, No. 87718). Dua germana-belga kunveno organizita de MOKA en Aitenberg (Germanujo), partopreno je multaj aliaj kunvenoj. Organizado de kelkaj internaciaj vojaĝgrupoj, speciale al Belgujo. Oficiala partopreno de MOKA je la internaciaj jubileaj solenoj kaj kongresoj en Budapeŝt.

**1931.** MOKA estis unu el la invitataj organizadoj por la pola-germana katolika konferenco en Kön. Publikigo de tre efikaj germanlingvaj Esperanto-propagandiloj. Partopreno en propagando por malmarmado. Oni koncentrigis multe da laboro al varbado por « La Juna Batalanto », kies abonantaro sukcese kreskis. MOKA partoprenis je la Internacia Ekspozicio de la Katolika Junularo en Bruxelles (Belgujo) kaj en la internaciaj studtagoj de la katolika junularo, kiuj okazis post la Katolika Junulara Kongreso de Bruxelles. Fondo de Esperanto-Propaganda Komitato, propagando por kombinita abono al la duŝemajna gazeto « Katolika Vivo » kaj « La Juna Batalanto ».

**1932.** MOKA-anoj gvide partoprenis en la Krucmilito de Eŭropa Junularo por Malmarmado.

## PRAKTIKAJ SERVOJ DE MOKA.

**Korespondado.** La internacia korespondado inter katolikaj gejunuloj estas unu el la plej efikaj iloj de vera interkompreniga agado. Ni peras korespondadon en Esperanto kaj en la ĉefaj naciaj lingvoj (precipe franca, angla kaj germana). Por ricevi korespondanton, oni skribu nomon kaj adreson, aĝon kaj profesion, lingvokojn kaj specialajn dezirojn. Bonvolu aldoni sumon sufiĉan per duobla letetrafranko.

**Informservo.** MOKA sukcese disdonas informojn pri junulara kaj paca movado en ĉiuj landoj. Ĉiujare aperas kelkaj listoj de gravaj internaciaj kongresoj kaj kunvenoj. Membroj ricevas helpon en eksterlandaj vojaĝoj.

**La Juna Batalanto.** Unu el la plej gravaj faktoroj de la MOKA-laboro estas la gazeto La Juna Batalanto, kiu aperas dumonate kaj publikigas principajn artikolojn kiel ankaŭ raportojn pri la junulara kaj paca movado.

**Esperanto-Propagando.** Por enkonduki Esperanton en la katolikan junularon, MOKA faris diversajn grandajn agadojn kaj laboradas daŭre per sia aktiva varbado. Ekz. 1927 ĝi publikigis alvokon « Katolika Junularo kaj Esperanto », kiu estis subskribita de gvidantoj el preskaŭ 40 ligoj de la katolika junulara kaj paca movado en germanlingvaj regionoj (Germanujo, Aŭstrujo, Svisujo kaj Ĉeĥoslovakujo). Grupoj kaj delegitoj de MOKA okazigis centojn de Esperanto-kursoj. MOKA troviĝas en konstantaj rilatoj kun multaj junularaj ligoj kaj povas tial efike propagandi.

## KIEL ONI POVAS HELPI?

**Fariĝu aktiva membro!** Akceptu la postenojn de deĝigito! Fondu MOKA-grupon, ĉu sendependan ĉu kiel sekcio de jam ekzistanta junulara unuiĝo! Komencu Esperanto-kurson! Klopodu por veni en kontakton kun tiuj rondo en via urbo, kiuj havas intereson por internacia kunlaborado, kaj prezentu al ili niajn ideojn!

**Fariĝu subtenanta membro!** Se vi ne povas aktive kunlabori, subtenu nin almenaŭ per via intereso kaj via kotizo! Kaj rakontu al ĝemikoj pri nia movado!

**Abonu nian gazeton La Juna Batalanto!** Ĝi devas fariĝi via ĉiama amiko. Ĝi estas malmultekosta, do ne hezitu, tuj sendi vian abonkotizon!

**Aĉetu viajn Esperanto-librojn ĉe ni!** Vi ne pagos pli ol aliloke, sed subtenos nian movadon! La eldonejo La Juna Batalanto posedas la plej riĉenhavan provizon de katolika Esperanto-literaturo!

## LA INTERNACIA KOMITATO DE MOKA :

**Protektoro :** Mons. D-ro G. K. Grafo Majlath, episkopo de Transilvanio, Alba Julia, Rumanujo; **Internacia Sekretario :** D-ro Wilhelm Solzbacher, Köln-Dillbrück, Bensbergstr. Marktweg 63, **Naciaj Sekretarioj :** A. Björnstad (Oslo, Norvegujo), Mariano Calvo (Buenos Aires, Argentino), Pastro Prof. Modesto Carolfi, O. F. M. (Guastalla, Italio), Fr. Andreo Chang, O. F. M. (Tsi-Nan-Fu, Ĥinujo), Simon Csora (Cluj, Rumanujo), Pastro Salvador Ester Palau (Barcelona, Hispanujo), Jan Filip (Hradec Kralové, Ĉeĥoslovakujo), Henriko Freibergs (Riga, Latvujo), Juan Maria Hashimoto (Tokio, Japanujo), Heinz Kolvenbach (Düsseldorf, Germanujo), Pastro Ludwik Kosyrczyk (Brzezn. Polujo), Vlado Kunič (Zagreb, Jugoslavujo), Pastro Walter Kosyrak (Aŭstrujo), Prof. P. J. A. Muffang (Paris, Francujo), Pastro László Németh (Congrad, Hungarujo), Hedefonso Nomez (Lima, Peruo), I. W. Stannard (Norwich, Anglujo), Eugen Vogt (Zug, Svisujo), Pastro L. Wolff, S. C. J., (Haderslev, Danujo), Rómulo Zeballos Morales (Montevideo, Urugvajo).

## La Juna Batalanto,

Organo de la Internacia Katolika Junularo kaj Paca Movado, eldonata dumonate de Mondjunularo Katolika (MOKA), estas redaktata nur en Esperanto kaj havas legantojn kaj kunlaborantojn en preskaŭ 80 landoj de ĉiuj kvin kontinentoj. Jen kelkaj juĝoj :

### Episkopo :

Mi esperas, ke ankaŭ la nova serio de La Juna Batalanto efikos tiom da bono kiel la antaŭaj jarkolektoj.

Mons. D-ro G. K. Grafo Majlath, episkopo de Transilvanio, Rumanujo.

### Famkonata teologia aŭtoro :

Esperanton mi ĉiam konsideris kiel grandan ilon por grandaj celoj; mi ĝojas, ke La Juna Batalanto bone komprenas tiujn celojn.

Prelato Prof. A. Dombrowski, Kaŭnas, Litovujo.

### Katolika ĉiutaga ĵurnalo en Ameriko :

La Juna Batalanto devus esti interesa por ĉiu katoliko interesita pri la internacia vivo.

The Daily American Tribune, Dubuque, Iowa, Usono.

### Juna ĥina franciskano :

Ni povas esti fieraj pri La Juna Batalanto. Ankaŭ ni junaj ĥinaj katolikoj kunlaboros laŭ niaj fortoj.

Pastro Joh. Bapt. Kao, O. F. M., Tung-Yuen-Fang, nun en Romo.

### Japana jesuito :

Mi tutkore dankas vin pro la belegaj kajeroj de La Juna Batalanto.

Pastro Fr. X. Abt, S. J., nun en Valkenburg, Nederlando.

### Nekatolika pacifista gvidanto en Svedujo :

Mi ne estas katoliko, sed mi volas vin danki el tuta koro pro la ĉefartikolo en La Juna Batalanto. Vortojn de tia valoro mi neniam aŭdis en mia laŭdo al junuloj en la protestantaj eklezioj.

Cefredaktoro Werner Oedegard, Hudiksvall, Svedujo.

### La plej konata Esperanto-propagandisto kaj instruisto :

Kun plezuro mi ĉie rekomendos La Junan Batalanton.

Pastro Andreo Cseh el Rumanujo, nun en Arnhem, Nederlando.

### Neŭtrala Esperanto-gazeto :

En ĝi blovas la vigla spirito de nuntempaj junulmovadoj.

« Heroldo de Esperanto », Köln.

RESENDU CI TIUN ALIGILON!

FORSTREKU, KION VI NE DEZIRAS!

Al la internacia sekretario de Mondjunularo Katolika (MOKA).

D-ro Wilhelm Solzbacher, Köln-Dellbrück, Bensberger Marktweg 63,  
Germanujo.

Mi volas aliĝi al MOKA kiel aktiva — subtenanta membro kaj pagas samtempe jarkotizon de.....

Se en mia loko ne estas Delegito de MOKA, mi estas preta, akcepti tiun postenon.

Mi abonas la gazeton LA JUNA BATALANTO kaj sendas al vi la abonprezon (2.— RM aŭ samvaloro por simpla abono, 3.— RM inkl. MOKA-membreco) per monbiletoj, poŝtmandato, ĉeko, respondkuponoj, al via poŝtĉeka konto.

Mi jam estas membro de jenaj movadoj aŭ asocioj :.....

Mi volas korespondi kun katolikaj gejunuloj en Esperanto aŭ en.....

lingvoj kaj havas jenajn specialajn dezirojn :.....

Bonvolu sendi al mi libro-prezaron de la Eldonejo La Juna Batalanto!

NOMO :

ADRESO :

AGO KAJ PROFESIO :

SUBSKRIBO

Poŝtkontoj : Köln 480.37 (Dr. Wilh. Solzbacher, Köln-Dellbrück), Strasbourg 8180 (P. J. A. Muffang, Bourg-la-Reine), Wien D 12.017 (Katholisches Kreuzbündnis für Oesterreich, Ortsgruppe Heiliges Feuer, Wien).

## La Pacifista Movado en Polujo.

De Pawel Roch, Krakow.

### II.

Inter la ekzistantaj politikaj partioj la *Pola Socialista Partio* (P. P. S.) havas energian sintenon por la paco kaj por kelkaj praktikaj internaciaj solvoj. Ĝiaj gvidantoj, kiel la deputitoj Daszynski, Liebermann, Zimiecki, Zulawski kaj aliaj, estis ĉiam konvinkitaj pacifistoj. En la lasta tempo la partio ne hezitis voĉdoni por la komerca kontrakto kun Germanujo, kvankam ĝi estis kontraŭbatalata per aliaj opoziciaj partioj, kiuj kondamnas ĉion, kion la nuna registaro faras. En la problemo de la naciaj malplimultoj la Socialista Partio havas tre liberalan vidpunkton. Bedaŭrinde la leĝoprojekto pri teritoria aŭtonomeco de la ukraina malplimulto, kiun la socialistoj prezentis al la Sejmo (parlamento), ne estas akceptita. La *Unuigo por Laboristaj Universitatoj* (Towarzystwo Uniwersytetu Robotniczego), kiu estas intime kunligata kun la Socialista Partio, vigle agadas por la paco.

La aliaj politikaj partioj havas multe malpli firman vidpunkton rilate la problemon de la pacifismo. Tio koncernas speciale la *Kampanan Partion* (Stronnictwo Ludowe) kaj la *Rĝistarano Blokon*. Kontraŭe la *Naci Demokrata Tendaro* (Oboz Narodowe-Demokratyczny) havas programon de naca egoismo kaj de senindulga batalo kontraŭ la naciaj malplimultoj.

Estas ĝojiga fakto, ke la pacifista movado ĉiam plifortiĝas en la *katolika tendaro* de Polujo. La agado de kelkaj eminentaj katolikaj gvidantoj, speciale de *Pastro Kostworowski S. J.* kaj de la nuna sekciestro en la ministrejo por kulturaj aferoj, *Grafo F. Potocki*, estas citindaj. Ili trovis organizan formon en la *Katolika Ligo de Polaj Pacanikoj* (Katolicki Związek Polskich Przyjaciół Pokoju), kiu laboras tre serioze sub gvido de *D-ro Henryk Dembinski* kaj *redaktoro Stanisław Sopiński*. Gravan grupon inter la katolikoj formas la *konservativaj rondoj*, kiuj, kontraŭe al la nacidemokratoj, montras vastan komprenemon por la problemoj de la internacia kunlaboro. Inter ili estas speciale citinda la profesoro kaj iama rektoro de la Krakova Universitato, *D-ro Stanisław Estreicher*, kiu verkis bonegan libron pri la pola pacifismo en la 16-a jarcento.

Praktikan esprimon trovis la pola paca ideo en la agado de la antaŭtempe mortinta iama pola ĉefministro kaj postea ministro por eksterlandaj aferoj, *D-ro Aleksander Skrzynski*. Lia ampleksa agado en la internacia politiko, kiu montriĝis precipe en lia aktiva partopreno je la laboroj de la Ligo de Nacioj kaj je la kreado de la Geneva Protokolo kaj de la Kontrakto de Locarno, multe helpis al tio, ke li posedas gravan lokon en la vico de la politikistoj de eŭropa signifo.

### III.

En ĉi tiu mallonga artikolo ni ne forgesu la agadon de la gazeto *Wiadomości Literackie* (Literaturaj Informoj). Tiu semajna gazeto bone redaktata okupiĝas ne nur pri literaturaj, sed ankaŭ pri sociaj kaj internaciaj aferoj. El la verkistoj, kiuj en ĝi faras pacifistan propagandon, estu nomata *Antoni Slonimski*. Li estas unu el la plej lertaj polaj verkistoj de la postmilita tempo kaj estas ankaŭ brila kaj sprita ĵurnalisto. Sian talenton kaj inteligentecon kiel ankaŭ sian nekutiman kuragon li tute dediĉas al la ideo de la paco.

Ankaŭ inter la pola *universitata junularo* ekzistas bona pacifista movado, speciale en Krakow. Tiu pacifista junularo laboras en plej malfacilaj cirkonstancoj, ĉar ĝi estas nur malgranda grupo en maro da naciistaj studentoj. Tamen ĝi energie laboras kaj esperas, ke estonte la nun ankoraŭ malforta kreskaĵo de la pola pacifismo fariĝos forta kaj vivdonanta. Pli posta tempo montros, ĉu tiuj fieraj revoj efektiviĝos.

## FLUGFOLIO POR MOKA EN ESPERANTO.

La kvarpaĝa teksto, kiu troviĝas en la mezo de ĉi tiu numero kaj donas ĉiujn informojn pri la MOKA-movado, estas eldonita kiel flugfolio kaj taŭgas por varbado. Ni presigis la foliojn sur bona, blanka papero, kiu estas pli bona ol tiu de J. B.

Propagandistoj bonvolu tuj mendi utilan kvanton! 10 ekz. kostas 0.25 RM, 50 ekz. 1.— RM.

Eldonejo La Juna Batalanto.

ĈI TIU NUMERO estas la lasta de la 6-a jarkolekto. Bonvolu tuj pagivan abonon por la nova jaro!

## NIA MOVADO.

### Internacia Oficejo.

La internacia sekretario ankoraŭ vojaĝadas kaj rekomencos sian regulan MOKA-laboron fine de aprilo.

### Ĉeĥoslovakujo.

Hradec Kralove. Nia nacia sekretario Jan Filip gvidas Esperanto-kurson en la pastra seminario kun 26 partoprenantoj.

### Danujo.

De kelka tempo nia germana amiko Ajo Allinger troviĝas en Danujo kiel Esperanto-instruisto laŭ la rekta metodo. Li Esperantistigis multegajn gekursanojn, ankaŭ kelkajn katolikajn pastrojn.

### Francujo.

Lille. Komence de marto okazis Internacia Kongreso por la Katolika Gazetaro, organizita de la katolika universitata asocio, kun internacia ekspozicio. MOKA estas ankaŭ invitita kaj profitis la okazon por ekspozicii siajn eldonajn, speciale nian gazeton La Juna Batalanto.

Nia franclingva informbulteno estas preta, la unua numero estas dissendata en ĉi tiuj tagoj. Postulu ĝin de la nacia sekretario de MOKA, P. J. A. Muffang, 14 bis, avenue Galois, Bourg-la-Reine (Seine).

### Germanujo.

Krucmilito por Malarmado. En kelkaj lokoj la MOKA-grupoj kaj MOKA-anoj estis en la unua vico por organizi la lokajn kunvenojn. Kie la katolika junularo preparis la manifestaciojn, ili estis la plej sukcesaj. Ekz. Duisburg havis 1500 partoprenantojn, Hamborn 400, Oberhausen 1000, Düren 150, Bonn 1600, Siegburg 1000, Honnef 400, Koblenz 1000, Darmstadt 600. Okaze de la Krucmilito kelkaj de niaj eksterlandaj geamikoj el la katolika junularo venis al Germanujo, ekz. Raymond De Becker (Bruxelles), Théo Léger (Bruxelles), Prof. Hubaux (Liège), Magda Yoors-Peters (Antwerpen), Betsie Hollants (Antwerpen). Ankaŭ Pastro Rémillieux (Lyon) estis promesinta veni; sed lastmomente estas malhelpita. El niaj germanaj geamikoj iris eksterlanden por la Krucmilito: D-ro Nikolaus Ehlen (Velbert) al Holando, Pastro Paul Bæuer (Pullheim) al Holando, Otto Steinbrinck (Bonn) al Holando, D-ro Wilhelm Solzbacher (Köln)

al Francujo kaj Belgujo, S-rino Alken (Frankfurt) al Francujo, Joseph Probst (Fenne) al Francujo, D-rino Klara Maria Fassbinder (Saarbrücken) al Francujo.

MOKA-grupoj, kvankam tute novaj, bone evoluas en Düren kaj Wewelsburg.

### Hindujo.

Travancore. En la supera lernejo de Pulincunoo Pastro Henry Joseph instruadas Esperanton al dekduo da studentoj. Al kelkaj el ili MOKA povis perikorespondantojn.

### Ĥinujo.

Nia iama nacia sekretario Pastro Joh. Bapt. Kao O. F. M., nun en Romo, skribis al ni en interesa letero i. a. : « Mi nun konstatas, ke pli kaj pli estas necese, labori por universala paco; sed por labori por la paca movado, ni devas propagandi nian MOKA-idealon! Mi neniam forgesis nian movadon, kiun mi tute amas. Mi intertempe skribis diversajn leterojn al niaj linaj MOKA-samideanoj, ke ili daŭrigu la propagandon. Pasintjare (en oktobro) mi skribis mallongan artikolon pri katolika internacia Esperantista junularo kaj nia MOKA, mi denove alvokis por nia movado; tiun ĉi artikolon mi sendis al ĥina katolika junula monata revuo.

### Italujo.

Roma. Pastro Kao, kiu nun estas en la internacia Kolegio de Sankta Antonio, skribas : « Mi ankaŭ trovas kelkajn Esperantistajn samideanojn en mia kolegio tie ĉi. Kaj mi kun ili parolas Esperante 4 fojojn en semajno; kaj ni parolas Esperanton pli facile kaj pli klare ol aliajn fremdlingvojn. »

### Rumanujo.

Cluj. Katolika junula gazeto « Jos Barat » (Bona Amiko) regule enhavas Esperanto-notojn.

## NIA MOVADO KAJ NIA GAZETO EN GRAVAJ ENCIKLOPEDIOJ.

De la dekvoluma *Leksikono por Teologio kaj Eklezio* (« Lexikon für Theologie und Kirche »), eldonata de la fama eldonejo Herder en Freiburg, ĵus aperis la tria volumo. En ĝi troviĝas artikoleto pri Esperanto, verkita de nia amiko Pastro F. Lukas en München kaj atentiganta pri MOKA kaj LA JUNA BATALANTO. Jen la teksto en la grava enciklopedio : « *Esperanto*, internacia helplingvo elpensita de la rusa-pola okulkuracisto Zamenhof (1859-1917). Por katolikoj ekzistas la 1910 fondita I. K. U. E. (Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista) kun la organo « *Espero Katolika* » (fondita 1903 de Pastro Emile Peltier), kelkaj naciaj ligoj, ekz. « *Germana Katoliko* » en Nürnberg, Katolika Unuiĝo Esperantista en Wien, 1920 estiĝis IKA (kun Esperanto-sekcio) kaj MOKA (Mondjunularo Katolika), katolika mondjunulara unuiĝo kun pacifista tendenco, kies organo nomiĝas « *La Juna Batalanto* » (Honnef a. Rh.). Pio X-a, Benedikto XV-a kaj Pio XI-a benis la katolikan Esperanto-movadon, kelkaj kardinaloj kaj episkopoj montris sian intereson. »

« *Les Documents de la Vie Intellectuelle* » (« La Dokumentoj de la Intelektala Vivo ») estas grava gazeto eldonata de la francaj dominikanoj. Ĝi volas disponigi al katolikaj gvidantoj interesajn kaj gravajn dokumentojn. En novembro 1931 longa artikolo pri la katolika junularo de Germanujo enhavis dupaĝan dokumentaron pri MOKA kaj ĝia germana sekcio, ankaŭ pri La Juna Batalanto. Baldaŭ aperos en la sama kolekto dokumentaro pri la internacia kunlaboro de la katolika junularo, kaj detala artikolo pri MOKA havos en ĝi honoran lokon.

La Svisa Katolika Junulara Asocio baldaŭ eldonos libron kun dokumentoj kaj artikoloj pri la katolikaj junularaj asocioj en la eŭropaj landoj. Ĝi enhavos longan artikolon pri MOKA.

« *Vrede als Daad*, Beginselen, Geschiedenis en Strijdmethode van de Direkte Aktie tegen Oorlog » (« Paco kiel ago, origino, historio kaj batalmetodoj de la rekta agado kontraŭ la milito ») estas la nomo de granda enciklopedio nederlandlingva pri la ak'iva paca agado. Ĝi estas verkita de B. de Light, kies mondkoncepto estas tre diferenca de la nia. Sed li kunportis mirinde multe da materialo, el la tempo de la malnovaj ĥinoj, egiptoj kaj hebreoj ĝis la plej moderna tempo. Sendube de Light estas la plej kompetenta konanto de la kontraŭmilita agado en ĉiuj epokoj kaj landoj. En la unua volumo de lia verko, aperinta antaŭ nelonge en Arnĥem, li ankaŭ multe parolas pri katolikaj pacifistaj movadoj, pri kiuj li ŝajnas pli multe scii ol la plej multaj katolikoj. Jen kion li skribas (en paĝo 296) pri MOKA kaj La Juna Batalanto: « En la romkatolika Esperantista gazeto « Blanka Kruco » aperis 1919 alvoko por fondo de pacifista katolika junulara mondligo. Ĝi fondiĝis sub la nomo « Mondjunularo Katolika » (MOKA) sub gvido de Pastro D-ro Metzger kaj Prelato Giesswein kaj troviĝas sub la protek'cio de grafo Majlath, episkopo de Transilvanio. Ĉi iu asocio jam kunvokis diversajn mondkongresojn kaj posedas nuntempe 45 naciajn sekciojn en 5 mondpartoj. Ĝia orgao nomiĝas « La Juna Batalanto ». En Germanujo tiu mi i. a. trovis la sciigon, ke la junaj antimilitaristaj katolikoj rigardas Sanktan Franciskon kiel ilian pioniron. Estas interese, ke en tiu movado batalo kontraŭ la milito kelkfoje kombiniĝas kun batalo kontraŭ la karaktero de la moderna socio. »

## SUR NIA LIBROTABLO.

*Recenzo de novaj libroj de internacia intereso.*

*Esperanto-libroj.*

*Sam Jansson*, Ovningsbok till Elementärkurs i Esperanto 32 pĝ., Stockholm 1931, Förlagsförenten Esperanto, pr. 50 öre.

*Rektor S. Jansson*, Texthäfte till Grammfonkurs i Esperanto, 20 pĝ., Stockholm 1931, sama eldonejo, pr. 60 öre.

*Miniaturatlas* över hela världen, 14 geografiaj kartoj, 16 tekstpaĝoj en sveda lingvo pri Esperanto, Stockholm 1931, sama eldonejo, pr. 35 öre.

Ĉiuj svedaj eldonaĵoj estas solide kaj fidinde prilaboritaj, la ekzercaro de rektoro Jansson estas bonega, kaj la miniatur-atlaso estas rekomendinda kaj malmultekosta donaco, kiu en utila maniero propagandas nian lingvon. Ĉu do pli taŭga okazo por tia propagando estas elpensinda ol aldono al geografia atlaso?

*En angla lingvo.*

*John Nibb*, Christianity and Internationalism, 78 pĝ., London 1932, Elliot Stock, 7 Paternoster Row, E. C., pr. 2.— ŝil.

Tre originala verkajo pri kristanismo kaj internaciismo. La aŭtoro estas unu el niaj samideanoj kaj abonantoj, de kiu ni en la lasta numero publikigis artikolon. La libro enhavas kuraĝajn ideojn, kaj kelkaj frazoj distingigas per klasika precizeco. Pri aliaj pensoj mi ne povas konsenti. Tamen la libreto estu rekomendata al niaj geamikoj, kiuj komprenas anglan lingvon. Ili lernos multe el ĝi. Ankaŭ pri la internacia lingvo la libro parolas.

*Rev. R. A. Mc Gowan*, Europe and the United States, Elements in Their Relationship, 48 pĝ., Washington 1931, Catholic Association for International Peace (1312 Massachusetts Avenue, N. W.), pr. 10 cents.

La Katolika Paca Ligo en Usono laboras precipe per publikigo de « raportoj » pri la faktoj kaj ideoj en la internacia vibo. La nuna raporto estas speciale valora, ĉar multaj amerikanoj havas tre naivan ideon pri Eŭropo. La aŭtoro estas tre sperta kaj uzis grandegan amason da literaturo. La broŝuro enhavas en malmulte da paĝoj multe da informoj. Ĝi estos utila al katolikaj gvidantoj ĉiulandaj.

*En franca lingvo.*

*St. François d'Assise*, Apôtre des Temps Modernes, par Emile Schwartz, Bruxelles, 16, rue Luther, 24 pĝ. grandformataj, 2 fr.

Nia amiko Emile Schwartz estas direktoro de la katolika paca gazeto « La Source » (La Fonjo) kaj vivas tute el spirito franciskana. La libreto estas tre ĝoja, tre pacema, tre poezia. Ĝi parolas pri granda apostolo de la moderna tempo, pri granda apostolo de la paco.

*En germana lingvo.*

*Hanns Gobsch*, Wahn-Europa 1934, Eine Vision, 352 pĝ., Hamburg-Berlin-Leipzig 1931, Fackelreiter-Verlag, tolbind, 4.80 RM.

La libro estas pli ol romano, ĝi estas averto al la eŭropaj popoloj, ke ili ne lasu plu kieski tiujn fortojn de la frenezeco, kiuj preparas novan militon. Pruvo pri la boneco de la libro estas la fakto, ke ĝi jam estas tradukita en pli ol 10 lingvojn. En la heroo de la romano, Brandt, oni kredis vidi la personon de Briand. La libro majstre skizas, ke ne nur tiuj estas kulpaj je la milito, kiuj intence preparas ĝin, sed ankaŭ tiuj, kiuj, tolerante malnovan diplomation kaj malnovajn « patriotajn » kutimojn, nenion faras, por malhelpi ĝin. Legu la libron, laŭeble en la originalo! Tiuj, kiuj ne komprenas germanan lingvon, aĉetu la tradukon!

*Cosmus Flam*, Das letzte Kleinod, Der Weg des Kunsthandlers Vincenz Josna Born, 336 pĝ., Breslau 1931, Bergstadtverlag Wlth. Gottl. Korn, tolbind, 5.50 RM.

En la lasta jaro ni recenzis « Athanasius » de Cosmus Flam. En tiu libro la juna silezia poeto montris la sorton de « Teilopa », en kiu li pentris esencan ekstrakcion de la « moderna civiliza progreso ». Nun li rakontas en sia nova romano la sorton de nuopulo. « La lasta juvelo » estas la Dia graco, penetranta en la mallumon de nia vivo, eĉ se ĝi pasas, kiel en nia libro, tra Berlino...

*Wilhelm Peuhler S. J.*, Im Zeichen Christi, Gebetbuch studierender Jugend. Kun enkonduko de P. Friedrich Muckermann S. J., 16-0, XIV + 380 pĝ., 1 bildo. Freiburg 1931, Herder, kart. 2.— RM, tolbind. 2.40 RM, ankaŭ en pli multekostaj bindaĵoj. Rabatoj ĉe aĉeto de kvantoj.

Preĝlibro germanlingva por la studanta junularo kaj adaptata al ĝia mentaleco. La mesliturgia troviĝas ĉiam en la centro, krome oni speciale bone zorgis pri komunaj preĝoj de migranta junularo. Ankaŭ notoj de la Missa de Angelis kaj de germanaj meskantoj (Speyrer Domfestmesse) enestas.

*Dr. V. Zalozičkyj*, Das geistige Leben der Ukraine in Vergangenheit und Gegenwart. (Deutschum und Ausland, herausgegeben von Georg Schreiber, Heft 28/29), V + 219 pĝ., Münster 1930, Aschendorff, broŝ. 7.10 RM., bind. 8.25 RM.

Unu el la plej interesaj popoloj de Orienta Eŭropo estas la ukraina. Praslavaĵoj, la fondinto de la unua ŝtato, Rurik la normano, kaj fine Bizan-slavaĵoj kaj ĝia kristanismo estas la fontoj de ĝia kulturo. La ukraina popolo estas tio kaj ĝia kristanismo estas la fontoj de ĝia kulturo. La ukraina popolo estas tiu kaj ĝia kristanismo estas la fontoj de ĝia kulturo. La ukraina popolo estas tiu kaj ĝia kristanismo estas la fontoj de ĝia kulturo. La ukraina popolo estas tiu kaj ĝia kristanismo estas la fontoj de ĝia kulturo. La ukraina popolo estas tiu kaj ĝia kristanismo estas la fontoj de ĝia kulturo. La ukraina popolo estas tiu kaj ĝia kristanismo estas la fontoj de ĝia kulturo.

*Linus Bopp*, Wir sind die Zeit. Zur katholischen Zeit-, Menschen- und Lebenskunde, gr. 8-0 (VIII + 198 pĝ.) Freiburg 1931, Herder, kart. 4.40 RM., tolbind, 5.40 RM.

Ni estas la tempo — ĝi troviĝas ne ekster ni, sed en ni! De tiu vorto de Pri liaj pedagogiaj kvalitoj ni jam parolis. Kompreni la tempon kaj formi ĝin sankta Augustinus Bopp eliras, por montri la gvidantan taskon de la kristanoj.



## Malmultekosta Katolika

### Esperanto - Literaturo

<b>Reinke</b> , Naturscienco, Mondkoncepto, Religio, famkonata verko, 164 grandformataj pagoj.	1.— RM, 1.50 RM.
<b>Litova Almanako</b> , 288-paĝa, favorprezo	
<b>Thomas a Kempis</b> , Imitado de Kristo, Unua Libro, 108-paĝa.	0.50 RM.
<b>Katolika Preĝareto</b> , 32-paĝa.	0.50 RM.
<b>Spirita Juvelaro</b> , Preĝlibro 292-paĝa.	2.— RM.
<b>Migrukunmi</b> , Preĝlibro 336-paĝa.	1.60 RM.
<b>Ben-dikto XV-a</b> , Kristo kaj la Ligo de Nacioj, 16-paĝa.	0.20 RM.
<b>Pio XI-a</b> , Universala Reĝeco de Kristo, 24-paĝa.	0.25 RM.
<b>Krane</b> , Graco atendanta, 12-paĝa.	0.20 RM.
<b>Prast</b> , Tarcizio, 20-paĝa.	0.20 RM.
<b>Frank</b> , La Patro, 16-paĝa.	0.20 RM.
<b>Monaens</b> , Nova Afriko, 32-paĝa.	0.25 RM.
<b>Bessières</b> , Parvuli, 32-paĝa.	0.25 RM.
<b>Freneuze</b> , Per Telefono, 12-paĝa.	0.15 RM.

La Juna Batalanto, Köln-Dellbrück  
Bensberger Marktweg 63, Germanujo.

Eksterordinare favora propono:

La famkonata verko

**Naturscienco,  
Mondkoncepto,  
Religio**

de Prof. Dr. Dr. D. Reinke,  
Esperanto-traduko de E. Brenken.

nun estas havebla por malpli ol la kvarono de la originala prezo. La verko estas grandformata kaj ampleksas 164 pagojn kaj kostas nur 1.— RM! Jen moderna libro pri naturscienco kaj religio en Esperanto-eldono! Utiligu la favorprezon! Mendu ĉe

Eldonejo La Juna Batalanto, Köln-Dellbrück, Bensberger Marktweg 63, Germanujo.

**DER  
GROSSE  
HERDER**

12 BÄNDE UND 1 ATLAS

**DER  
NEUE  
TYP  
DES  
LEXIKONS**

**Gründlich  
und lebendig  
zuverlässig  
und praktisch**

12 Bände sind erschienen!



Der Buchhändler gibt Auskunft

**VERLAG HERDER/FREIBURG/BREISGAU**